

Neuniversalaj aspektoj de esperanto laŭ Akiko Woessink-Nagata.
« Eŭropaj kutimoj kaj la tutmondigo de esperanto »
Esperanto de UEA, majo 1976
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 673, 1976.09.01 & 03 & 04

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La revuo Esperanto de UEA publikigis en majo 1976 artikolon de sinjorino Akiko Woessink-Nagata, kiu ŝajnas al ni leginda, ĉar ĝi reliefigas la neuniversalajn aspektojn de esperanto. Sinjorino Akiko Woessink-Nagata estas japanino edziĝinta al nederlandano. Kun sia edzo ŝi ĵus iris kontakti nome de UEA la estraron de Ĉina Esperanto-Ligo, kaj ni esperas, ke tiu ĉi unua oficiala kontakto inter UEA kaj ĈEL favoros la disvolviĝon de la lingvo internacia al ĉiam pli granda internacieco.

A.- En sia artikolo **Eŭropaj kutimoj kaj la tutmondigo de Esperanto**, sinjorino Woessink-Nagata montras, ke Zamenhof kaj la esperantistoj adoptis diversajn kutimojn tipe okcidentajn. Ŝi memorigas, ke la nunan homaron konsistigas 57 procente loĝantoj de Azio, 13 procente eŭropanoj, 10 procente afrikanoj, 9 procente loĝantoj de Nord-Ameriko, 6 procente loĝantoj de Soveta Unio, 5 procente sud-amerikanoj kaj fine eĉ ne unuprocente loĝantoj de Oceanio. Restas nerenversebla la fakto, ke iom pli ol duono de la tuta homaro estas la aziaj popoloj, kies granda parto havas neniajn ligojn kun la tiel nomataj eŭropaj kutimoj. Kaj ŝi listigas la eŭropajn kutimojn ĝis nun enkondukitajn en la uzadon de Esperanto.

Cl.- Ŝi tute prave parolas pri la diskriminacia kutimo de la seksaj titoloj. Sub la influo de la eŭropaj esperantistoj, en esperanto oni distingas alparole sinjorinon de fraŭlino, dum por la viroj oni ne distingas la sinjorojn de la fraŭloj. Ekzistas landoj, kie oni ne distingas alparole sinjorinon de fraŭlino, kiel en Eŭropo oni ĝenerale ne distingas sinjoron de fraŭlo, nek inon de malino. Ekzemple en Japanio, kie estas simpla titolo **san** por ĉiuj homoj, esperanto-lernantoj devas lerni la eŭropan kutimon distingi la homojn per sinjoro, sinjorino kaj fraŭlino, krom lerni la lingvon mem. Por la popoloj, kiuj ne kutimas distingi viron kaj virinon per tiaj titoloj, kiaj sinjoro kaj sinjorino, estas plia ŝarĝo atenti ankoraŭ tion, ĉu ŝi edziniĝis aŭ ne. Al la ofta demando de kursanoj : « Kial ne fraŭlo ? », la kursgvidanto hezite respondas : « Oni kutimas distingi la edzinecon de la virino, sed ne la viran edzecon. Estas eŭropa kutimo, kiu enradikiĝis en esperanto. » Kompreneble, konkludas sinjorino Woessink-Nagata, konsciaj kursanoj ne kontentiĝas per tiaspeca respondo.

A.- Koncerne la respektajn titolojn sinjorino Woessink-Nagata memorigas, ke ekzistas nacioj, kiuj ne uzas tiajn titolojn, escepte de la kazoj, en kiuj la titolo havas veran signifon kaj rolon. Koncerne esperanton Akiko Woessink-Nagata prave rimarkigas, ke nuntempe la esperantistoj de landoj, kie oni ne kutimas distingi homojn per titoloj, ne kuraĝas agi laŭ sia maniero por ne ofendi homojn, kiuj kutimas esti tiel distingataj, kaj finfine simple imitas ilian kutimon. Tiel uzataj estas difinitaj titoloj, kiel doktoro, profesoro, inĝeniero, super la aliaj profesioj kaj scioj. Ŝi montras, ke oni kopiis eĉ la lingvo-kutimon, kiel - ekzemple - « Ŝia moŝto, la reĝino Juliana », « Lia ekselenco la ambasadoro ». Kaj ŝi prave aldonas, ke ĉiuj lernantoj de esperanto en landoj, kie oni ne kutimas fari tion, devas lerni ankaŭ tiun eŭropan kutimon, kun la lingvo, kiu pretendas esti neŭtrala kaj internacia.

Cl.- Koncerne la kalendaron Akiko Woessink-Nagata montras, ke esperanto uzas dat-sistemon, kiu ne estas tutmonda. La nuna islama kalendaro havas pli junan jaron, ol la kristana jaro 1976. Ankaŭ aliaj aziaj landoj, kiel Indonezio, havas malsamajn jarojn. La

nomoj de la monatoj devenintaj de la romiaj regintoj, kiel Julius kaj Augustus, estas tute ne uzataj en Azio. Ekzemple en Ĉinio, Indonezio, Japanio kaj Koreio la monatoj estas nomataj simple 1-a monato, 2-a monato. La nomoj de la ĉina semajno estas nur la 1-a ĝis la 7-a semajn-sepono.

A.- La datsistemo en Azio ĝenerale estas, samkiel ekzemple en Hungario : jaro/monato/tago, diference de la ĝenerale eŭropaj sistemoj : tago/monato/jaro aŭ monato/tago/jaro. Sinjorino Woessink-Nagata rememorigas, ke Internacia Organizaĵo por Normigo antaŭ kelko da jaroj alprenis la sistemon jaro/monato/tago, kiel internacie rekomendinda.

Cl.- Plurajn aliajn ekzemplojn ankoraŭ donas Akiko Woessink-Nagata pri la eŭropa karaktero de esperanto. Inter ili ni citu tiun-ĉi : La monda organizaĵo UN estas en la menso de la parolantoj de eŭropaj lingvoj plurala kiel Unuiĝintaj Nacioj, sed - ekzemple - por la ĉinoj, japanoj kaj koreoj UN estas Unuiĝinta Naciaro, ĉar ĝi estas entute unu organizaĵo. Esperanto feliĉe havas la sufikson -aro por tia celo. Kial ne uzi ĝin ?

A.- Ni esperas, ke tiu ĉi artikolo aperinta en la UEA-revuo **Esperanto** instigos la esperantistojn reekzameni kelkajn el siaj kutimoj. Instrui la Internacian Lingvon en kursoj ekster Eŭropo ne devus signifi instrui samtempe eŭropajn kutimojn.

Cl.- Ni esperas, ke la artikolo ĵus resumita helpas la esperanto-socion emancipiĝi de pensmaniero eŭropocentrisma, simile al la liberiĝintaj aziaj kaj afrikaj popoloj, kiuj nun emancipiĝas de ekskoloniaj kutimoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!